# *Ministroj pri eksteraj aferoj de ?inio kaj Kubo konfirmas historiajn rilatojn*

Image not found or type unknown



**Foto: Spanish.xinhuanet.com**

Havano, jun 7 (RHK) La bonega stato de ligoj, historiaj ligoj, frateco kaj amikeco inter ?inio kaj Kubo estis emfazita de la Ministroj pri Eksteraj Aferoj, Bruno Rodríguez, membro de la Politika Buroo de la Partio kaj Wang Yi.

Anka? membro de la Politika Buroo kaj Estro de la Oficejo de la Centra Komisiono pri Eksteraj Aferoj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de ?inio, Wang Yi emfazis la pozicion de Pekino  subtene al ?esigo de la ekonomia, komerca kaj financa blokado trudata de la usona registaro kontra? Kubo. Same, li malakceptis la arbitran kaj unupartian inkludon de Havano en la liston de ?tataj sponsoroj de terorismo.

Siaflanke, la ministro de la plej granda el Antiloj, kiu faras oficialan viziton kiel speciala sendito de la kuba prezidento, Miguel Diaz-Canel, ratifis la pozicion de sia lando favore al la principo de unu ?inio. Same, li emfazis la klopodojn de Pekino por nacia reunui?o, kaj kondamnis enmiksi?on en la internajn aferojn de

la azia giganto.

La eksteraferaj ministroj aludis la altan nivelon de kunordigo kaj politika konsento inter la gvidantoj de la du nacioj en la disvolvo kaj plifortigo de politika dialogo, kernaj aferoj de reciproka intereso, kaj la la?grada progreso en la konstruado de komunumo kun komuna estonteco inter Kubo kaj ?inio.

Fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/356759-ministroj-pri-eksteraj-aferoj-de-cinio-kaj-kubo-konfirmas-historiajn-rilatojn

**Radio Habana Cuba**